

CxEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Cxehxa Esperanto-Asocio sendata al cxiuj rete atingeblaj membroj de CxEA sed ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Cxehxio. Gxi neniam enhavas aldonajxojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ilin, sufixas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO:

1. UK en Roterdamo (NL)
2. Nova Esperanto-Centro en Budapesxto
3. Esperanta teksto en la pagxaro de Konsilio de Euxropo
4. Auxstria ministerio informas en Esperanto
5. CxEHxA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS (OFICIALA ORGANO DE CxEJ)
6. KALENDARO de E-ARANGxOJ EN CxEHxIO kaj ORGANIZATAJ EL CxEHxIO
7. Bondeziroj

1. UK en Roterdamo (NL):

La 93-a Universala kongreso de Esperanto okazos inter la 19-a kaj 26-a de julio en Roterdamo (NL). Bv. atenti, ke la 1-a aligxperiodo kun la plej favoraj kotizoj finigxas fine de decembro, do ne plu estas tempo por hezito kaj necesas pagi tuj. Pli da informoj cxe la cxehxa UK-peranto: chrdle@kava-pech.cz. La planita buskaravano pro malmultaj aligxintoj ne okazos kiel planite, tre versxajne gxi tamen okazos per malgranda buseto. Pli da informoj mirka.tomeckova@seznam.cz.

2. Nova Esperanto-Centro en Budapesxto

La 20-an de novembro en 2007 en Budapesxto estis inauxgurita nova, moderna Esperanto-Centro de Eventoj! Gxi servas kiel hejmo por la Esperanto-Lingvolernejo de Lingvo-Studio, por la E-organizajxo "Kultura E-Asocio cxe Eventoj", kaj ankaŭ la hungara junulara E-organizajo, HEJ trovis cxi tie sian novan bazejon. La nova ejo certigas idealan lokon por plej diversaj kunvenoj, prelegoj, konferencoj aux aliaj diversaj Esperantaj programeroj. Cxe la retpagxo <http://www.esperanto.hu> --> "aktualaj novajxoj" estas videbla mallonga foto-kompilajxo pri la ejo kaj pri la inauxguro. Gratulon al niaj hungaraj samideanoj kaj persone al la potenca motoro Laszlo Szilvasi!

3. Esperanta teksto en la pagxaro de Konsilio de Euxropo.

La 20an de decembro, danke al la la agado de la skipo cxe www.edukado.net, la traduko de la Esperanto-versio de la Komuna Eŭropa Refrenckadro pri lingvoj enlistigxis en la pagxaro de la Konsilio de Eŭropo. Laŭ la plej freŝaj informoj la Esperanto traduko estas la 32a

versio, ecx antaŭ kelkaj oficialaj lingvoj de EU (ekz. la dana).

Vidu la koncernan pagxon

http://www.coe.int/T/DG4/Portfolio/?L=E&M=/main_pages/levels.html, klaku sube sur "esperanto".

Mi ripetas la tre utilan pagxaron por cxuiuj, kiuj en ajna nivelo lernas aux instruas) esperanton: <http://www.edukado.net>

4. Aŭstria ministerio informas en Esperanto

Danke al Leopold Patek ni povas informi vin, ke Aŭstrio estas versxajne la unua EU-lando kie ministerio informas ankaŭ en Esperanto. Jen:

Aŭstria Federacia Ministerio por Ekonomio kaj Laboro:

www.arbeitsinspektion.gv.at/NR/rdonlyres/56825F26-6ACD-4E72-B8D9-73D47BD9044B/0/arbig_esperanto.pdf

La laborloka taksado (2 pagha faldfolio)

www.arbeitsinspektion.gv.at/NR/rdonlyres/F3D61CAD-33D6-48DE-9EDD-98FF3EBC6064/0/eval_eo.pdf

kaj

Mashinoj, laboriloj (2 pagha faldfolio)

www.arbeitsinspektion.gv.at/NR/rdonlyres/08B688F9-5221-4228-96FD-FB1B6286B1AD/0/ce_eo.pdf

5. CxehxA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS

(OFICIALA ORGANO DE CxEJ redaktata de Marek Blahuš)

Cxehxa Esperanto-Junularo (CxEJ) eniris liston de studentaj organizoj ACSA, unusola tia en Cxehxio (127 organizoj). Rete legeblas raporto de Mirek HRUŠKA pri la kunveno en Světlá. Cxehxa Radio aperigis la 19-an de novembro en porinfana elsendo "Domino" dekseksminutan programon pri esperanto, preparitan kaj gastitan de Dan MRÁZEK. Dum okazinta konkurso auxskultantino Lada gajnis DVD-n Esperanto Elektronike, donacon de CxEJ.

Artikolo "Esperanto" en cxehxa versio de Vikipedio eniris liston de 19 elektitaj "elstaraj artikoloj". Vikipedio estas vaste sekvata de gxenerala publiko, tial bona reprezento en gxi tre gravas. La artikolon, prilaboritan de Marek BLAHUŠ, Petr DOHNÁLEK kaj Stanislav ŠTOČEK, estas rekomendinde tralegi cxe <http://cs.wikipedia.org/wiki/Esperanto>

Novembre Tomáš BŘICHÁČEK kaj Dáša CHVÁTALOVÁ prezentis esperanton dum foiro Expolingua en Prago. Decembre Marek BLAHUŠ prelegis pri junulara utiligo de esperanto en universitataj kursoj de Josef VOJÁČEK (4-foje en Brno, 1-foje en Olomouc, sume al 47 studentoj). La 15-an de decembro li ankaŭ reprezentis Cxehxion dum Zamenhof-festo en Vieno.

En Brna klubo Karol RYDLO prezentis esperanton al siaj kunstudantoj cxe FIT VUT, Mirek HRUŠKA raportis pri vojaĝo al Ukrainio en studenta revuo de gimnazio Slovanské náměstí. En Prago sub gvido de Dan MRÁZEK rekomencigxis kursoj "Esperanto cxe biero". Aktualajxoj pri cxehxa

junularo troveblas cxe <http://cej.esperanto.cz/>

6. KALENDARO de E-ARANGxOJ EN CxEHxIO kaj ORGANIZATAJ EL CxEHxIO

2008-04-04/06: Sabla Printempo en Písek, turisma, kultura kaj faka programo (dauxrigo de la seminario "Esperanto en la reto". Inf.: esperanto.pisek@seznam.cz

2008-04-?? (precizigota): Adonido, renkontigxo de natur- kaj vin-amantoj en Vracov + Ratíškovice. Inf.: melicharkova8@seznam.cz

2008-04-14/21: Printempa E-kurso organizata de Asocio de Esperantistoj Handikapuloj, Skokovy. Inf.: aei-ikeh@volny.cz

2008-06-29/07-12, -07-13/26, -07-27/08-09. Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, la Esperanto-arangxo kun la plej longa tradicio en Cxehxio, jam kvindekan fojon en la sama loko! Cxiutaga antauxtagmeza lauxelekta instruado de lingvo (cxiam ankaux Esperanto elekteblas). Inf.: podhradská@volny.cz

2008-07-18/27: Autobusa karavano al la 93-a Universala kongreso de Esperanto en Roterdamo. Inf.: mirka.tomeckova@seznam.cz

2008-07/28-08/04: KRISTANA KONGRESO (la 58-a kongreso de KELI) en la hotelo ESPERANTO en Pribylina, Slovakio. Atentu, ke ankaux por cxi tiu kongreso la unua, plej favora kotizperiodo finigxas fine de decembro 2007. Pliaj informoj kaj aligxiloj: Pavel Polnický, cea.polnický@quick.cz

2008-08-23/30: EKOTUR 08, Tradicia ekoturisma renkontigxo por biciklantoj kaj piedturistoj kun komunaj vesperaj programoj. Karlštejn cxe Prago, inf.: chrdle@kava-pech.cz

2008-10-03/05: La 12-a kongreso de Cxehxa Esperanto-Asocio, kun elekto de novaj komitatanoj de CxEA en Přerov. Inf.: jirka.tomecek@post.cz.

2008-10-06/12: InPaSem 2008 (Internacia Paroliga Semajno), Kurso por komencintoj kaj seminarioj por jamaj parolantoj. Antauxtagmeze instruhoroj, posttagmeze turisma programo en Prago kaj cxirkauxajxo. Dobřichovice, inf.: chrdle@kava-pech.cz.

2008-11-07/09: KAEST 2008 (Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) en Dobřichovice. Inf.: chrdle@kava-pech.cz

2008-11-28/30: IKF (Internacia Kultura Festivalo) en Ústí nad Labem, inf.: m.smyčka@seznam.cz

En la kalendaro estas envicigitaj nur la eventoj, kiuj okazos en Cxehxio aux organizataj el Cxehxio. La eventojn en eksterlando vi trovos cxe <http://www.eventoj.hu/kalendar.htm>

Cxu vi ne trovis vian arangxon en la listo? ne kulpigu nin, sed vin mem, ja ne eblas envicigi eventon, pri kiu ni ne konscias. Pri la preparataj arangxo**j** bv. sendi informon al chrdle@kava-pech.cz, ke gxi povu esti envicigita en la venontan Kalendaron.

6. BONDEZIROJ:

Nome de la komitato de CxEA kaj de la ceteraj membroj de la redaktokonsilio mi deziras al vi gajajn kristnaskajn festotagojn kaj bonan enpaxon en la jaron 2008. Petro Chrdle, vicprezidanto de CxEA kaj redaktoro de la CxEA-retkomunikoj